

& Libertempo:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kiel por &Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Mara bordo kun hoteloj, ; Pavilonoj kun terasoj, ; Kie sur salikfoteloj ; Lacertumas ĉiuj rasoj...

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas ; Mi pri peno ne promesas ; kaj urĝemon venkis mi ; Tion mi ĝoje konfesas.**)

'2 Ŝajno, ŝajno, pantomimoj, ; Nek senzorgo, nek ripozo! ; Amelitaj modviktimoj, ; Via paco estas... pozo!

.....

'3 Ĉar monduma stulta kodo ; Ankaŭ tie ĉi rigoras, ; Kaj la sklavo de la modo; Libertempe nur... deĵoras

'4 Kaj kompatas min, barbaron ; Kiu ŝatas nur kamparon ; Sen deviga kostumŝanĝo ; Post kaj antaŭ ĉiu manĝo!

,& Dua:

'5 Ho benata nest' vilaĝa, ; Nelekata de l' kulturo, ; Virga ĉarmo, ĝoj' sovaĝa ; Hejmas meze de l' naturo;

'6 Kaj neniu aŭtomato ; Negre bruas en "dancingo", ; Nek radio-aparato ; Kurzojn krias de l' sterlingo!

'7 Pura estas ĉiu herbo, ; Sanon portas ĉiu colo, ; Korpo tie ĉi kaj cerbo ; Ĝuas pacon de l' izolo...

'8 Mi sopiras nostalgie ; Al ĉi tiu nesto, kie ; Kampa vivo kaj ferioj ; Ne jam estas "industrioj"!